



Informoj:
Arto -- Literaturo
Turismo -- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakejo:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

PLENUMA DECIDO

Laŭ unuanima decido aprobita je la lasta ĝenerala kunsido de Frateco kaj per multenombraj geesperantistoj, dum la vespero de la proksime pasinta 31^a de majo, efektiviĝis donaco, de la pergameno en kiu konstatas la titolo de Honora

Maynar kaj finis per la sekvantaj kortusaj vortoj: — Mi, sinjoro, je la nomo de ĉiuj fratecanoj ĉeestantaj kaj forestantaj, mi ĉirkaŭpremas vin. Tiel finis ĉi tiu emocia parto de nia vizito al nia honora Prezidanto.

Sinjoro Maynar post la ricevo de tiu arta pergameno (pentrita de la zaragozana pentristo, sa-



Pergameno donacita de «Frateco» al nia Honora Prezidanto sinjoro Manuel Maynar Barnolas.

Prezidanto, al la fervora kaj vigla esperantisto S-ro. Manuel Maynar Barnolas.

Okaze de ĉi tiu okazintaĵo, S-ro. Maynar tute kortusata esprimis sian eternan dankon al la fratecanaj ĉeestantoj, rememorante sian amon al Frateco kaj Esperanto.

Nia Prezidanto S-ro. Orós respondis al sinjoro

mideano S-ro. Elpidio Jato), regalis malavare siajn vizitantojn per bongustaj kukoj kaj saŭma ĉampano, kaj ne mankis tie, dum kelkaj horoj, kiuj fariĝis mallongaj, nek bonhumoraj babiladoj nek tiu gaja kamaradeco, propraj ĉe la esperantistoj.

J. L. B.

NIA KLUBA BIBLIOTEKO

Laŭ deziro esprimata en la lasta kunsido de la komitato de Frateco, oni decidis akiri por la kluba biblioteko preskaŭ ĉiujn novajn verkojn kiuj aperis en la Esperanta mondo lastatempe. Per tio nia societa libraro, kiu jam konsistas el multaj belaj kaj tre interesaj verkoj, riĉiĝos pli kaj pli.

Nu, tio estas ja ofero kiun Frateco faras, celante ke ĝiaj asocioj havu kiel eble plej multenombrian kaj allogan materialon, per kiu ili povu

kompletigi sian lingvan scion kaj ĝuadi la belajojn de ĝia literaturo. Ni petas do, niajn korajn fratecanojn, respondu al tio per tre ofta luado de libroj el nia biblioteko.

Post kiam oni jam ellernis la fundamenton de nia lingvo, estas ja malsaĝaĵo ne liveri al ni plezuron per tralegado de niaj belaj verkaĵoj, same kiel per ofta Esperanta konversacio.

Ni rememorigas, ke la luprezo estas nur 10 centimoj ĉiusemajne po libro portita hejmen.

La Bibliotekisto,
RAMÓN DE SALAS.


KIEL MALPROGRESEMA ESTAS HOMARO!


Malsamajn lingvojn uzas nur homar'
Post Dia trafa pun' en Babel-tur',
Landlimo jen fariĝis hina mur'
Izoliganta pli ol vasta mar'.

La malsamlingva nevenkebla bar'
El homoj faris malamikojn nur,
L' interkonsenta paco kaj plezur'
Ne plu regadas ĉe l' Adam-idar'.

Kompaton sentis por la homoj Di'
Kaj venis en la mondon Esperant',
Mirinda per simpleco kaj graci'
Belsona lingvo, kiel rava kant.

—Ĉu ĉiu ĝin alprenis ter-naci?
—Ne moku min, mi petas, ho legant'!

VICENTE INGLADA.

Madrido.

* * *

Kiu ne konas tiun nomon? Certe ne ekzistas hispana esperantisto kiu ne legis ĝin. La eminenta geografia inĝeniero, aŭtoro, krom aliaj verkoj, de la vortaroj Hispana-Esperanta kaj Esperanta-Hispana, kiuj gvidis niajn unuajn paŝojn tra Esperantujo, skribis al ni tre afablan leteron per kiu sciigas nin... «mia plena tutkora aliĝo al via Societo «Frateco» kies grandan sukceson mi plej varme deziras»... «kaj dezirante helpi vian Bultenon mi sendas kune kvar miajn esperantajn verkajetojn kiuj povos empresigi en NIA VIVO, nur se vi trovas ilin taŭgaj por tia honoro»... «se via Bulteno kreskas, kiel ni ĉiuj devas varme deziri, kaj fine ĝi fariĝas la centra organo de la hispanaj esperantistoj, el tiuj kiuj amas liberecon interfratiĝon kaj nur celas idealan senprofitan kaj senpartian propagandon de Esperanto—nur por Esperanto mem kaj ne por persone absolutaj aŭ politikaj celoj—tiam vi povas kalkuli je mia plena helpo al tia granda entrepreno kaj mi plej volonte verkus longajn artikolojn propagandajn, literaturajn, amuzajn aŭ instruajn...»

Ni ridetis. Ĉu S-ro. Inglada estas iom ŝercanta?

Ke se ni trovas viajn skribaĵojn honorigindajn per ilia publikigado en NIA VIVO? Sed... diru altestimata S-ro. Inglada: Kio estos honorigita; ĉu viaj skribaĵoj, ĉu nia gazeteto? Ni kredas ke tiu ĉi lasta, sed se vi opinias kontraŭe, ni ne volas diskuti... por ke vi ne ĝeniĝu... «Se via bulteno kreskas...» Por tio, Frateco penas tiom kiom ĝi povos; sed la legantoj diros la lastan vorton per ilia helpo.

Ni sekvos tiel bone, kiel ni scios, viajn saĝajn konsilojn kaj pri nia senpartia celo, ni atentigas ke la artikoloj subskribitaj, kiuj estas publikigitaj en NIA VIVO prezentas nur la opiniojn de iliaj

aŭtoroj, kiuj povas esti aŭ ne tiuj de Frateco aŭ de la Direkcio de NIA VIVO. Tio estas: Pri tiuj skribaĵoj respondas nur iliaj aŭtoroj. Ni nur petas la devigan respekton por la kontraŭaj opinioj.

J. ORÓS.


INTERNACIA KOLONIO EN HISPANUJO


La Ministro de Publikinstruado organizis internacian kolonion en Madrido kunmetatan de germanaj kaj hispanaj infanoj. Unu el la gazetoj publikiganta la sciigon aldonas: «Per tiu ĉi kolonio hispan-germana komenciĝas la internaciaj rilatoj. Tio estos la plej bona paciga agado efektivigota de la hispana respubliko».

La ministro projektas pligrandigi ĉi tiujn koloniojn kunvenigante infanojn de diversaj landoj per kio la paciga idealo elmontriĝos en Hispanio vere kaj praktike.

Laŭdinda estas la ideo de la ministro inspirata de l' deziro encerbigi en la infanojn amon al la homaro kaj krei amikecon en ĉiuj partoj de la mondo.

Tre trafe estus apliki komunan idiomon en tiu ĉi momento, ĉar se la kolonianoj ne interkompreniĝas, kvankam ili kunvivados, restos tiel izolitaj kiel se miloj da kilometroj apartigus ilin. Oni formas grupojn laŭ nacioj, sed ne laŭ inklinoj kiuj ne povos esti malkovritaj pro tio ke mankos rimedo por interkompreno malsukcesigante la deziron de la leĝdonanto.

Estas interese ke la gejunuloj ludigu iliajn korpajn aktivecojn; ankaŭ klerigi iliajn intelektojn per loĝado pli malpli longa en diversaj landoj, sed pli grave estas enradikigi en iliajn korojn la sentojn de homa solidareco kiu devas esti la ĉefa celo de la kolonio. Tiu ĉi somera ripozado ludos la rolon de eduka kurso semante la pacan ĝermon por esti kulturata en la respektivaj landoj rikoltante la frukton vane serĉatan en la Palaco de Hago kiu nur trafis subteni armitan pacon ruinigantan la landojn.

Lernantoj el superaj institutoj partoprenas tiun ĉi kolonion, sed oni ne atingos la celon ŝajne serĉatan se lernantoj de nesuperaj lernejoj restas forgesitaj de la koloniaj organizantoj.

Manko da klereco faciligas la enŝovon de gravaj eraroj kaj pro tio ke la plimulto da homoj ricevas nur la elementaran instruadon, oni bezonas ilin pretigi por formi konscian armeon anstataŭ blindaj instrumentoj de ne ĉiam lojalaj direktantoj. Ni iras al nekonata socia evoluo kaj necesas ke la plej abunda materio, la ĝisnun obeanta homotavolo, estu kiel eble plej bona, klera kaj morala.

La profesoroj gvidantaj la koloniojn devas esti liberspiritaj, rigardante la homaron laŭ ĝia tutajo anstataŭ enfermiĝi en la mallarĝaj naciaj limoj.

E. ARTIGAS.

SKOLTISMO

Zaragozaj skoltoj vizitis Asturion kaj Majorkon

Laŭ ĉiujara kutimo la skoltoj de Zaragoza organizis ekskurson por la somera libertempo. Tiun ĉi jaron oni dividis la grupojn kaj la du malgrandaj vizitis Majorkon. La ceteraj organizis belegan ekskurson por viziti Asturion.

Dum la du unuaj semajnoj de la monato Aŭgusto oni efektivigis tiujn belegajn migradojn. Pli ol tridek junaj knaboj vojaĝis al Barcelono kaj poste per ŝipo al Palma de Majorko. Lerte viglitaj de siaj estroj, la skoltoj starigis tendaron apud la belega Kastelo de Bellver. Dum dekkvin tagoj ili estis en Majorko kaj vizitis la tutan urbon. Ankaŭ ili rondiris piede la insulon, vizitante la ravajn havenojn kaj pejzaĝojn videblajn en tiu parto. Ankaŭ vizitis la famkonatajn Grotojn de l'Drako. Tre ĉarma vizito. Naturo elmontriĝis tie mire belega. Post feliĉa restado la skoltoj sin turnis de nove al Zaragoza ĉarmigitaj pro Majorkaj belajoj.

Samtempe, la skoltoj pli aĝaj efektivigis pli gravan ekskurson. Dekkvin skoltoj vojaĝis al Bilbao kaj sekve al Santander. Vizitis la urbon detale kaj poste ili daŭrigis sian vojaĝon ĝis Ribadesella (Asturio). Tie ĉi ili starigis Tendaron. Dum dek ses tagoj ili vizitis tiun ĉi belegan parton de la Asturia marbordo. Ankaŭ ili efektivigis ekskurseton por admiri Covadonga, lulilon de la hispana realmilito. Ankaŭ Cangas de Onis, unua kortego de D. Pelayo, Arriondas, k. t. p. estis vizititaj de la skoltoj. La skoltoj de Gijón vizitis la zaragozanajn en Ribadesella. La Tendaro estis mire organizata kaj estis tre ofte vizitata. Fine la skoltoj forlasis Ribadesella'n. Ili vizitis Bilbao kaj la havenon Abra, Santurce, Portugalete, Las Arenas, k. t. p. Bonege impresitaj pro belajo, rigardataj la skoltoj atingis Zaragoza'n tute feliĉe.

A. PEDRO MARQUETA.

Hispana Esoerantista Konfederacio

Laŭ invito al ĉiuj regionaj esperantistaj federacioj aliĝintaj al la Konfederacio, okazis dum la 11^a kaj 12^a de la nuna monato, la unua kunveno de Delegitoj por pitrakti la provizora regularon. Ĉeestis nome de Kataluna Konfederacio S-roj Alberich kaj Gili, de la Orienta Federacio S-roj Bruquetas kaj Maynar; de Aragona Federacio S-roj Maynar kaj Orós; de Oviedo S-ro Salas. Ankaŭ ĉeestis kiel invitatoj S-ro Capdevila kaj Etayo kaj alia samideano, kunportante salutojn de la samideanoj de Baracaldo. Oni legis salutleterojn de S-roj Piñó de Valencia, Mániz de Cheste kaj Allende de Bilbao. La regularo estis aprobi-

ta, kun malmultaj modifoj, kiel estis publikigita en Progreso Esperantista. Inter la kunvenantoj estis granda ĝojo kaj esperantema sindonemo. Oni elektis kiel Prezidanto S-ron Alberich kaj kiel Sekretario S-ron Bruquetas. Oni decidis ke la Aragona Esperanta Federacio estu dum la du venontaj jaroj la Centra Komitato.

Post la kunvenoj, la Delegitoj estis akceptitaj de «gefratecanoj» en nia socia ejo. Nia Prezidanto S-ro Orós salutis la vizitantojn je la nomo de Frateco. Respondis S-ro Alberich atentigante la «fratecon» kiun oni sentas en «Frateco» la esperanta Zaragoza domo.

S-ro Gili Norda aŭdigis nin gramofonan diskon kun la voĉo de Zamenhof eldonitan de K. E. F. Oni petis al S-ro Gili ke li sendu kelkajn el tiu diskoj. Ni diras tion ĉar se eble ia fratecano deziras aĉeti iun (kostas 10 ptj), ili estos sendataj ĉiuj kune. Fine S-ro Gili amuzigis la ĉeestantojn per spritaj kartludoj.

MIA UNUA VERKAĴO

I

Unue, karaj gesamideanoj, mi salutas vin ĉiujn kaj poste mi komencos mian rakonton.

Mi neniam verkis kaj pro tio mi komencas kaj ne scias ĉu mi finos.

Sed kiel mi komencu?

Mi rigardas la nubojn, sed la nuboj diras al mi neniom; mi kuŝigas miajn kubutojn sur la skribtablo kaj per miaj manoj batas mian frunton, sed mia kapo estas tiel malmola ke ĝi esprimas neniom. Sed atendu, karaj legantoj, ĉar je la pordo de mia loĝejo iu vokas.

Estas la leteristo; agrabla afero al mi; mi ricevas tri leterojn kaj du belajn poŝtkartojn el miaj fremdaj esperantaj gesamineanoj, sed pardonu geamikoj, ĉar alian fojon oni vokas je mia pordo.

Nun ne estas leteristo, estas pli malagrabra afero; juna kaj forta knabo, per larmoj je siaj okuloj, petis al mi almozon, dirante ke li estas senlaborulo kaj havas malsanan patrinon. Tiu ĉi knabo memorigis al mi alian junan viron, kiu loĝis en vilaĝo ne malproksime de Zaragoza.

Tiu ĉi viro laboris en granda sukerfabrikejo kaj kvankam ne multe gajnis, li estis feliĉa, ĉar li estis edzo de bela, pura kaj ŝparema virino kun kiu estis havanta ĉarman trijaran infaninon.

Kiam li estis venanta de la laboro, antaŭ la pordo de sia hejmo atendis lin la bela infaneto kriante: —Patro, patro!

Kiel dolĉe ŝajnis al li ĉi tiuj vortoj!

Kaj kiel bonaj kaj satantaj la manĝaĵoj kiujn la edzino metis sur tablon kovratan per blanka tuko!

Sed iu kunulo de la sama fabrikejo kie li laboris diris iam al li: —Ĉu vi volas gajni multe da mono?

Petro respondis (ĉar tiel estis sia nomo):—Mi ne bezonas multe da mono, sed se la laboron mi povas fari, mi akceptas ĝin.

—La laboro ne estas multa kaj la afero estas tre farebla.

—Bone, kian laboron mi devas fari?

—Ĉi tie ne estas ejo konvena por paroli pri tia afero. Se vi volas venu ĉi tiun nokton je la deknua horo kaj ni parolos kaj komencos la laboron.

—Sed ĉi tiun aferon ĉu oni devas fari nokte?

—Jes, sed venu kaj mi konvinkos vin, diris per brilantaj okuloj, kaj adiaŭiris.

Petro pripensis: —Kiel mi diros al mia edzino ke mi devas eliri nokte de mia hejmo, se mi eliras ĉiam kun ŝi? Ĉu mi devas diri la veron?

—Sed pro kio mi sentas timon? Ĉu mi estas faronta malbonaĵon?

Kiam Petro iris en sian hejmon estis malbonhumora pro la multaj pensoj kiuj estis turmentantaj sian imagon, kaj sendube pro tio, kiam li atingis sian hejmon, li ne vidis la larmojn kovrantajn la vizaĝon de sia edzino.

Ŝi restis tute surprizata ĉar Petro ne demandis pri la filineto, kaj diris plorante al li:— Ho, Petro!, ĉu vi ne demandas pri nia filino? Ĉu vi ne vidas ke nia filino ne atendas vin antaŭ la pordo de nia domo?

Eniru en nian dormoĉambron, eniru, nia filineto estas malsana.

Petro ŝajnis vekiĝi je longa sonĝo kaj kuris dormoĉambron dirante: —Ĉu estas vere, nia filino malsana?

La geedzoj rigardis la palan vizaĝon de la infanino senspire, sed ŝi malfermis la okulojn kaj diris:

—Patro, patro!, mi havas doloron ĉi tie, kaj ŝi montris sian longaharan kapeton.

—Mia filineto, ne ploru!, vi devas esti kvieta kaj dormi trankvile, kaj tiel morgaŭ vi estos tute sana; Petro parolante tiel palpis la frunton de la etulino kaj rimarkis ke ŝi havis grandan febron.

PILAR SALVO.

(Daŭrigota).

Petego.—La pedelo de nia societo devas porti la kvitancojn ĉiumonate ĉe la societanojn. Al ĉiuj Fratecanoj ni petegas ke ili sciigu pri la neplenumo de tiu devo de l'pedelo, se ĝi okazos. Ni ankaŭ petegas al iuj kunsocietanoj kiuj havas kelkajn kvitancojn ne pagatajn, bonvolu aboni ilin por ke ni povu bone prezenti la kontojn ĉe la proksima ĝenerala kunsido.—*La Komitato.*

◀ SCIIGOJ ▶

En la salono en kiu nia Komitato kunsidas, ekzistas portreto de Nia kara Majstro, dediĉita de li al «Frateco» per tiuj vortoj:

Al la Grupo «Frateco» en Zaragozo, pro memoro L. Zamenhof.—9-9-09.

Tiu ĉi portreto estis dediĉita kiam Dro Zamenhof venis al Barcelono por prezidi la 5^a Universalan Kongreson de Esperanton, al kiu alestis 1.300 esperantistoj el 32 landoj.

S-ro. Francisco Azorín, Deputito, aliĝis al nia Societo. Li ankaŭ donacis al ni 200 ŝlosilojn Ĉefeĉ kaj sin oferis al ni. Ni multe dankas sinjoron Azorín pro ĉio, kion li faras je favoro de Frateco. Ankaŭ estas deputitoj de la nuna Parlamento la esperantistoj S-roj Almada kaj Redondo al kiuj, laŭ decido de la Direktanta Komitato, Frateco sendis koran saluton je la nomo de ĉiuj Fratecanoj.

Laŭ nia, scio estas esperantemaj la sekvantaj Deputitoj: Sroj Alomar, Gassols, D'Olwer, Domingo, Formiguera, Maciá, Sarria, Gil y Gil, kaj aliaj kies nomojn ni ne konas ankoraŭ. Sendube ke Esperanto havas nune bonegan okazon...

Por la familio de S-ro Floría.—«Frateco» malfermis monkoklekton por la familio de nia malfermiĉa samideano. Ni publikigos, laŭ la liberloko permesos al ni, la nomojn de la donintoj.

(Daŭrigo)

D. G. Bonel, 1 peseta, don J. Caudepón, 2; don F. Martínez, 5; don F. Etayo, 10; don E. Repollés, 5; don J. Gilaberte, 2; un sacerdote, 5; don F. Veira, 2; don M. Delpón, 3; un zaragozano, 5: una zaragozana, 3; Srta. A. B., 6; Srta. J. S., 1; un sacerdote, 3; dos esperantistas, 8; don Andrés Piñó, de Valencia, 25; Dependencia mercantil de las siguientes casas, afiliados a la U. G. T.: De «La Campana de Oro», 11; de «La Palma», 14; de «Almacenes Cativiela», 10'50; de «Almacenes del Pilar», 22; de «Almacenes Gómez y Sancho», 13'50; de «Almacenes del Carmen», 23'50; de «Almacenes viuda de Mazón», 19'75; de «Almacenes El Pequeño Catalán», 10; de «Almacenes Casa Polo», 26; don S. Viñuales, 5.

(Daŭrigota).

Loterio.—En tiu ĉi jaro, Frateco aĉetis por siaj gesocietanoj, 2.000 pesetojn en numero 17.732 de la Kristnaska loterio kaj eldonis partojn po unu peseto. Ni sciigas ĝin al niaj gekunsocietanoj por ke tiu kin volos ludi, diru ĝin al nia kasisto antaŭ la 15.^a novembro.